

# La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

Alveno de la 100-a numero	2	Lingua franca nova	9-10
Helpo al Haitio	3	La côte des Neiges	11
E-Vortaro de la franca lingvo	4-5	Maren' kant'botelo	12
Februara renkontiĝo	6	Internaciaj anoncoj	13-14
Kiun flagon por la tero?	7-8-9	Venontaj aktivajoj	15

## MEKARO en Trivero

Suzano Roy




Ĉi-jare, la MezKanada Renkontiĝo okazos en Trivero, de sabato 22<sup>a</sup> ĝis lundo 24<sup>a</sup> de Majo. Estos, kiel kutime, longa semajnfino kaj bonega okazo por iom turistumi kaj malkovri alian regionon. Trivero estas mezgranda urbo (loĝ. ĉ. 130 000), inter Kebeko kaj Montrealo. Pasintjare ĝi festis la 375<sup>an</sup> datrevenon de sia fondo.

Jam delonge nia urbo ne akceptis Esperantan kunvenon kaj ni, Triveranoj, entuziasme pretigas interesan renkontiĝon. Ni fieras pro nia agrablega urbocentro, ĉe la riverego. Ni elektis por vi antikvan domon kiel renkontejon, la domo Hertel-de La Fresnière. Ni proponas al partoprenontoj ĉarmajn kaj ne tro kostajn hotelojn, ĉiujn urbocentre, ene de kelkaj stratoj.



Malnova malliberejo



Katedralo Notre-Dame-du-Cap



Strato des Ursulines



Domo Hertel-de La Fresnière

Venu al MEKARO! Vi povos malstreĉiĝi en agrable etoso kaj fari historiajn, kulturajn, artajn, naturajn malkovrojn. Vidu la programon ĉe la retejo de ESK...

Ni celas fari el tiu semajnfino ne nur turistan aferon, sed veran Esperantan eventon. Do ni multmaniere okazigos interagojn kaj diskutojn. Vi certe pliboniĝos vian lingvonivelon kaj ekkonos novajn geamikojn.

*Ni antaŭĝojas akcepti vin en gastama Trivero!*



## Alveno de la 100-a Riverego!



Francisko Gauthier

Karaj legantoj, ĉu vi sciis ke la ĉefredaktisto kaj grafikisto de via bulteno estas profesia grafikisto? Tio ebligas min proponi al vi tutspecialan kunlaboron por via centa eldono kaj la venontaj. Nu, mi preparis kvar versiojn laŭ kiuj povus aspekti estontaj Riveregoj, kaj mi petas vian partoprenon por elekti ĝian simbolon kaj stilon, tiel ke ĝi estos tia, kia ni volas ĝin. Bonvolu sendi vian elekton al [riverego@esperanto.qc.ca](mailto:riverego@esperanto.qc.ca).

Notu tiun adreson, vi plej eble uzos ĝin denove! Efektive, mi intencas igi *La Riverego* pli interaktiva, mi daŭre enmetos en ĝin artikolojn kiuj postulas vian agadon, kaj vi vidos vian bultenon fariĝi pli kaj pli la ilo de la esperanta komunumo, kebekiskale.

Ekde ĉiam, artikoloj pri nia propra komunumo estas la prioritato en *La Riverego*, kaj tio daŭros. Kun pli kaj



pli da iloj por informiĝi pri la ĝenerala movado kaj pri la mondo en esperanto (ekz. [www.esperanto.com](http://www.esperanto.com), [www.eventeo.net](http://www.eventeo.net)), oni sentas kreskan fakiĝon de la diversaj eldonaĵoj de nia mondo. Oni vidas emon de la regionaj iloj iĝi pli kaj pli iloj de retigo, de plifortigo en la malgrandaj asocioj kiel la nia. En logika sekvo de tiu emo, ankaŭ *La Riverego* iĝos pli kaj pli nia ilo, nia esprim-spaco. Do, neniam hezitu sendi artikolon, reagon aŭ komenton al [riverego@esperanto.qc.ca](mailto:riverego@esperanto.qc.ca).

## Helpo al Haitio

Ruben Torres, la plej bona konanto de la situacio de esperantistoj en Haitio, skribas:

Mi ne scias ĉu vi jam konas la teruran situacion de Christine Theano, esperantistino el Pernier, vilaĝeto tre proksima de Portoprince en Haitio.

Bone, la muroj de ŝia domo falis, ŝi perdis kelkajn familianojn (inter ili sian fraton) kaj nun ŝi dormas surstrate ĉar la strukturo de la domo estas malbona. La konstruaĵo de la lingvistika centro kie ŝi laboris kolapsis kaj ĉiuj ŝiaj lernantoj mortis.

Tiel malaperis ankaŭ la kunvenejo de la lokaj esperantistoj, taksataj je ĉirkaŭ 20, kaj perdiĝis ĉiuj libroj en Esperanto.

Se vi volas helpi Christine rekonstrui sian domon, bonvolu sendi financon subtenon (ankaŭ malgrandan) al UEA kun la indiko «Espero-Haitio». Temas pri la konata konto Espero de UEA, kiu helpas en kazo de militoj aŭ naturaj katastrofoj.

Se vi volas pli ĝenerale helpi la movadon en Haitio rekonstrui sian kunvenejon, restarigi sian bibliotekon, sendi reprezentanton al la Universala Kongreso en Kubo kaj tiel plu, sendu vian kontribuon al la Amerika Komisiono de UEA per la indiko «Amerika Komisiono-Haitio».

Por ambaŭ celoj pagu al UEA laŭ la kutima maniero, kiun vi uzas, tra via peranto, tra kreditkarto aŭ PayPal.

## Aide à Haïti

*Je ne sais si vous connaissez la terrible situation de Christine Théano, espérantiste de Pernier, un petit village très proche de Port-au-Prince, à Haïti.*

*Eh bien, les murs de sa maison se sont effondrés, elle a perdu quelques membres de sa famille (parmi eux, son frère) et elle dort maintenant dans la rue parce que la structure de la maison est en mauvais état. Le bâtiment du centre linguistique où elle travaillait s'est effondré et tous ses élèves sont morts.*

*C'est ainsi que la salle de réunion des espérantistes locaux, estimés à une vingtaine, a elle aussi disparu, et que tous les livres ont aussi été perdus.*

*Si vous voulez aider Christine à reconstruire sa maison, veuillez envoyer un soutien financier (même minime) à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) avec la mention «Espero-Haïti». Il s'agit du compte connu «Espero» de l'UEA, qui aide en cas de guerres et de catastrophes naturelles.*

*Si vous voulez aider plus généralement le mouvement à Haïti à reconstruire une salle de réunion, à reconstituer sa bibliothèque, à envoyer un représentant au Congrès Universel d'Espéranto à Cuba, etc., veuillez envoyer votre contribution à la Commission Américaine de l'UEA avec l'indication «Amerika Komisiono-Haïti».*

*Pour les deux buts, payez à l'UEA de la façon que vous utilisez habituellement, par le biais de votre représentant, avec une carte de crédit ou PayPal.*

**Renato Corsetti, Martin Schaeffer, Ruben Torres**

## Esperanto-Vortaro de la franca lingvo

*Manuel Campagna compile depuis 1995 un Dictionnaire espéranto de la langue française désormais riche de plus de 20 000 fiches, et Francis Gauthier l'a interviewé pour La Riverego.*

Dimanĉon 2010 02 28 en la Sabla Monteto (najbaraĵo en Otavo)

**Francis Gauthier:** Saluton.

**Manuel Campagna:** Saluton, Francisko.

**Francisko:** Ĉu vi povus respondi kelkajn demandojn por ke mi skribu artikolon pri ĝi por aperigi en *La Riverego*?

**Manŭelo:** Mi estas tre feliĉa respondi viajn demandojn, kaj vi povos simple aperigi nian interparoladon. *La Riverego* nun ne plu estas papera sed nur fulma (*électr(on)ique*), do la spaco estas praktike senlima.

**Francisko:** Unue, pri kio temas ekzakte ?

**Manŭelo:** Temas pri la amasiĝo de la fulmaj kartoĵoj (*fiches*), kiujn mi plenumas ekde tiam, kiam mi decidis en 1995 Esperantigi rakontumon (roman) repagonte al Esperanto la beletran riĉaĵon, kiun ĝi alportas al mi el pli ol cent lingvoj ekde mia Esperantistiĝo en 1979. Tiuj kartoĵoj ĉiam estis dekomence fulmaj, do ne paperaj.

En la komenco ĝi estis sufiĉe praeca, kun nur franclingvaj temvortoj (*entrées*) kun Esperantaj egalvortoj (*équivalents*). Sed finante la tradukon de la unua rakontumo kaj decidinte, ke mi volas mem eldoni ĝin, do mi devas starigi eldonejon, do mi devas havi sufiĉe da tradukoj por eldoni,

mi rapide konstatis, ke kelkaj Esperantistoj unue interesitaj de la ideo baldaŭ retiriĝis komprenante pri la kvanto da laboro kaj mia altnivela postulemo (same por mi kiel por aliaj). Do mi simple komprenis, ke almenaŭ ĝis la malfermo de mia eldonejo mi devos fari la tutan laboron.

Mi ankaŭ komprenis, ke mi bezonos pli seriozan kartaron, kiun mi iam povos interrete proponi (kontraŭpage) por konsultado al la tutmonda Esperantistaro. Grade mi disvolvis la ideon de tuta lingva trezoro enhavanta ne nur Vortaron sed ankaŭ Vortumaron (*Phraséologie*), Bestnomaron (*Bestiaire*), Vegetaĵnomaron (*Plantaire*) kaj Historigeografian Nomaron.

Mi ankaŭ difinis la formon de la vortara karto: temvorto, priskribo de la vorto (ĉu ingenra substantivo, ĉu duagrupa verbo ktp kaj, se temas pri verbo, ĉu transitiva ktp), lingva deveno, rimarkigoj (*propre/figure, fako, lingvonivelo ktp*), internacia elparolo, difino, ekzemplo (ĉi tion mi ankoraŭ ne enpraktikigis), Esperanto-egalvorto kaj ekzemplo (ankaŭ ĉi tion mi ankoraŭ ne enpraktikigis).

Ĉiu senco de ĉiu vorto estas temo de karto.

**Francisko:** Ĉu iu reala kompleta vortaro?

**Manŭelo:** Plena vortaro entute neblas (spite la titolon de iu fama vortaro). Se konsideri ĉiujn sencojn de ĉiuj francaj vortoj, mia vortaro devus enhavi dekmilionojn da kartoĵoj.

**Francisko:** Per kiu metodo vi laboris?

**Manŭelo:** Unue mi esploras la sencon de la vorto en la devenlingvo (*langue de départ*), ĉu franca ĉu itala. Plej

ofte la senco estas trovebla en unulingvaj vortaroj de la devenlingvo, plej ofte per difino, sed tro ofte nur per ekzemplo. Tamen la aŭtoroj ne nepre konstante konsultas sialingvajn vortarojn, kiam ili verkas siajn verkojn. Aldone ofte okazas, ke la vortaroj entute ne enhavas la koncernan senco eĉ tiam, kiam ili enhavas la vorton mem. Tro ofte la aŭtoroj uzas sialingvan vorton en senco pruntita de alilingva simila vorto.

Helpe mi konsultas je la *Grand Dictionnaire français-espéranto*, sed tro ofte tiu proponas nur ion nesufiĉe precizan, se entute ion ajn ĝi proponas. Ĝiaj 929 paĝoj tute malsufiĉas kompare la ŝajne senfundan puton de la vortrezoro posedata de la koncernaj beletristoj.

Aldone mi penas resti ĉe la Fundamento (enkalkulante la aldonajn de la Lingva Komitato sed evitante tiujn de la Akademio). Tre helpas la konsultado de angla, germana, (antikva kaj moderna) helena, hungara kaj latina vortaroj. Tre ofte la egalvortoj en almenaŭ iu el tiuj lingvoj estas kunmetaĵo, kiun mi do facile imitas. Ege bedaŭrinde mi tute ne konas la ĉinan, ĉar ĝi estus grandskale utila: la nuna ĉina skribo konsistas el malpli ol 7 000 fundamentaj ideskribaĵoj, kiujn la uzantoj kunmetas por esprimi ĉiujn eblajn ideojn. Grava modelo por la disvolviĝo de la Esperanta vortrezoro.

**Francisko:** Pri kio vi pli fieras pri via vortaro?

**Manŭelo:** Mi jam sufiĉe ofte ricevas utilan rezulton, kiam mi konsultas ĝin.

**Francisko:** Kiu vorto estis la plej malfacile tradukita?

**Manŭelo:** Mi neniel kapablas respondi ĉi tian demandon. Cetere oni tradukas ne vorton sed tekston. Tradukado ne konsistas el la anstataŭigo de devenlingva vorto per cellingva vorto, sed el la laŭeble fidela kaj konvena redono de senco. Vortaro proponas eblaĵojn. Se neniu el tiuj eblaĵoj konvenas, nepras esplori trovonte alian pli ĝustan eblaĵon.

**Francisko:** Ĉu vi pensas ke la vortaro havos aliajn eldonojn?

**Manŭelo:** Mi entute ne eldonis ĝin. Oni ne atendu paperan formon. Kiel mi jam diris, mi esperas iam havi la eblecon havebligi la enhavon interrete por sciigpetoj. Mi imagas, ke ĉiu pagata peto rajtigos je tri sciigpetoj kun rezultoj (se iu sciigpeto ne ricevas rezulton, oni rajtas je plua sciigpeto). Tiuj sciigpetoj rajtus celi ne nur la Vortaron sed ankaŭ la Vortumaron kaj la aliajn kartarojn.

**Francisko:** Kaj ĉu vi ŝatus havi helpon pri tio?

**Manŭelo:** Kompreneble mi ĝojus pri helpo daŭrigi, plibonigi kaj plivastigi mian vortarumadon, sed eĉ pli mi ĝojus pri helpo daŭrigi, plibonigi kaj plivastigi mian beletran tradukadon kaj efektivigon de miaj aliaj planitaj kaj planotaj eldonaĵoj. Mi plej volonte akceptus vizito(j)n de Esperantisto(j) interesataj interparoli la aferon kun mi.

**Francisko:** Fartu bone!

**Manŭelo:** Ankaŭ vi. Mi dankas pro la okazo disvastigi la sciigon pri mia plano.

## Februara renkontiĝo en Montrealo — temo: Italio

Zdravka Metz 

Itala vespermanĝo kunigis nin, dekdu esperantistoj en la E-domo. Kiel kutime, alvenis kelkaj novuloj, ĉefe komencantoj. Ili ĉiam agrable surprizas nin pro jam bona regado de la lingvo post nur kelkaj lecionoj.

Same okazis je la lasta vendredo de februaro: la unua, José Luiz Pedron, helpinstruisto ĉe Montreala Universitato, kiu mem naskiĝis en Brazilo, sed kies gepatroj estas el Italio. La dua, Oscar Alberto estas studento pri matematiko ĉe Universitato Concordia, origine de Meksiko. Kluban vesperon ĉe MEDO partoprenis ankaŭ Nicolas, Petro, Minjo, Francisko, Suzano, Karlo, Johano kaj malnova membro Maurice De Kinder.



Minestrana supo, italaj fromaĝoj kun olivoj, lazanjo kaj salato, kune kun citrona kuko kaj itala vino alproksimigis al ni tiun belan kaj mediteranean landon.

La konversacioj dum kaj post la manĝo same turnis ĉirkaŭ Italio. Pluraj travivitaj anekdotoj pri la lando ridigis ĉiujn. Suzano Roy ŝatus partopreni E-kongreson en Italio en aŭgusto kaj invitis nin iri kun ŝi. Normando preparis kvizon pri konataj Italoj kaj italaĵoj.

Bona kaj amika humoro regis dum ĉi renkontiĝo kaj ĉe la fino ni rendevuis por la marta renkontiĝo, kies temo estos Kebekio. Marto estas ja la monato de acersiro; ni esperu, ke estos nova neĝo por povi pretigi aceran karamelon. Nepre informu nin, se vi intencas partopreni: [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)



# Kiun flagon por la Tero?

*Silvano Auclair*

**L'auteur présente et critique quelques drapeaux représentant la Terre entière.**

Kvankam flagoj estas ĉefe uzataj por distingi homajn grupojn unujn disde la aliaj (kaj eĉ reĝimentojn ene de armeo), oni povus, en la hodiaŭa mondo, deziri montrisian apogon al la ideo de unueca homaro per uzo de flago por la tuta Tero. Imagu, se la astronautoj estus starigintaj sur la Luno tian flagon anstataŭ la Usonan!

Oni povas pensi, ke tio estas revo, sed internacia lingvo ankaŭ estas revo, ĉu ne?



Estis pluraj proponoj por tia flago. Du el ili estis vere uzataj por tiu celo. La unua estas la flago de Unuiĝintaj Nacioj. Mi eĉ legis, dum mi

esploris por tiu ĉi artikoleto, ke iu proponis uzi ĝin por la vojaĝoj al la Luno. Bedaŭrinde, ĝi estas nur flago de organizo, kiun organizon krome ne ĉiuj ŝatas.




Alia flago estas tiu de la Tago de l'Tero. Ĝia kreinto eĉ asertas, ke ĝi estas LA flago de la tuta Tero. Bedaŭrinde, ĝi ĉefe peras ekologian mesaĝon (kvankam ĝi es-

tas tre bona mesaĝo) kaj estas ligita al specifa evento kaj tago. Krome, imagu se ĉiuj lernejoj de la mondo devus lerni desegni ĝin: ĝi surhavas veran foton de la Tero, el la raketo Apollo X-a.

Sekve, kiun flagon uzi? Estis pluraj proponoj, iuj seriozaj, iuj malpli. Unue, ni preterpasu tiujn variajn flagojn uzatajn kadre de tiuj sciencfikciaj verkoj, en kiuj la Tero estas unu el pluraj loĝataj planedoj. Restas kelkaj projektoj. Jen ili.

Du el tiuj flagoj similas al ekzistantaj naciaj flagoj kaj surhavas naciajn aŭ religiajn simbolojn. Tial, laŭ mi, oni devas ekskludi ilin. Mi tamen prezentas ilin, por ĉies klerigo. La unua estis proponita de S-ro George Dibbern (Germano kiu konsideris sin sennacia) kaj ĝi surhavas la krucon de Sankta Georgo, simbolo de Anglio.



La alia, proponita de S-ro David Barthalomew, surhavas la simbolon de daoismo, kiel la Korea flago. La kvar koloraj bendoj (estas blanka bendo, apenaŭ videbla, ĉe la malsupro) signifas la kvar ĉefdirektojn. La koloroj de la cirklo indikas la maran kaj teran vivon.




Jen alia flago kiu, kiel tiu de Unuiĝintaj Nacioj, uzas



bildon de la Tero, kvazaŭ mapon. Oni ne scias, kiu verkis ĝin. Eŭropanoj kaj Afrikanoj certe ŝatos ĝin, ĉar iliaj kontinentoj staras en la centro!

Ĉu vi memoras la flagon de la Olimpiaj Ludoj? Ĉe ĝi, la kvin ringoj indikas la kvin kontinentojn kaj iliajn loĝantojn. S-ro Jean-Sylvain Delroux, la kreinto de la venonta flago, sekvis similan ideon: la kvar koloroj ĉirkaŭ la centra blua rondo (la Tero, memevidente) reprezentas la kvar ĉefajn homajn rasojn. Mi ne scias, kion vi pensas pri ĝi, sed mi ne aprezas la ideon dividi la



homojn laŭ la koloro de ilia haŭto. Jen tamen la flago:

Hispana veksilologiisto (veksilologio estas la scienca studo pri flagoj), S-ro Pedro M.

Quesada, proponis la jenan flagon dum la kongreso de 2008 de la Hispana Societo de Veksilologio. Ĉar mi ne estis trovinta la signifon de la koloraj bendoj, mi skribis al li kaj recevis jenan klarigon (mi resumas el la hispana).

Estas kvar manieroj klarigi la kolorojn, kiuj kontraŭstaras neniun religion aŭ pensmanieron. La unua estas laŭ

la historio de la vivo sur Tero. La plej larĝa bendo reprezentas la tre longan antaŭkambrian eraon, dum kiu la vivo aperis en la akvo (tial la bluo), sed pri kiu ni konas malmulton (tial la malheleco); la verda bendo, paleozoikon, kiam aperis la kreskaĵoj; la bruna bendo, mezozoikon, dum kiu regis la dinosaŭroj, kun sia bruna (?) haŭto; fine, la oranĝa bendo, kenozoikon, kun la mamuloj, inter kiuj homoj (reprezentataj sen klarigo per oranĝa koloro). Proporcioj pli malpli rilatas al la daŭroj.


Dua maniero, laŭ la eraoj de la homa historio. Blua: antikvecon, dum kiu fiŝkaptado estis grava parto de ekonomio (?); verda: mezepekon, dum kiu gravis agrokultivado; bruna, la modernan epokon (ekde la 15-a jarcento): la bruna koloro estas tiu de la ligno de la ŝipoj de la Grandaj Malkovristoj; oranĝa, la nunan epokon kaj la demografian kreskon.

Tria maniero, plej evidenta, laŭ la geografio: la blua reprezentas la marojn; la verda, la arbarojn; la bruna, la montarojn; kaj la oranĝa, la vivantajn estaĵojn kaj la dezertojn.

Fine, laŭ la kontinentoj (sidiĝu!): la blua memorigas Oceanion kaj Antarktikon; la bruna, Azion pro ĝiaj montoj; la verda, la Amerikojn pro la tropikaj arbaroj, kaj Eŭropon, pro la sama motivo (?); kaj la oranĝa, Afrikon, pro la kresko de la dezertoj...

Nu...






La lastaj tri proponoj prezentas astronomian vidpunkton. La unua estas la tre ambicia Flago de Unueco de la Tero. Ĝi montras la Sunon, la Teron kaj la Lunon, kaj reprezentas la vivon (en ruĝa), ĉiujn kredojn (en oranĝa), varion (en viola) kaj la diversajn politikajn sistemojn (per blankaj kaj nigraj bendoj). Krome, la tri grandaj koloraj partoj devus alterni. (Provu fari tion ĉe vera teksaĵa flago!) Laŭ mi, multe tro bunta kaj malfacila por flago celanta reprezenti unuecon!

La jena estas projekto proponita de Usona artistino, nome S-ino Frances J. Bergmann, kiu laboras malantaŭ la nomo Fibitz Reality Adjustment. Arte tre bela. La verda kaj helblua arkoj reprezentas la vivtenan atmosferon.



Fine, alia astronomia flago, de S-ro James W. Cadle. Ĝi simple vidigas la Sunon, la Teron kaj la Lunon en simbola maniero.



Persone, mi elektus unu el la lastaj du.

Sed... ĉu mi ŝercas aŭ seriozas? Kion vi pensas pri la tuto?

## Ĉu kreolo kiel internacia lingvo?




**Silvano La Lacerto Auclair**

*L'auteur présente d'autres langues construites à vocation internationale. Cet article présente un créole à base de langues latines.*

Dum mi esploris por la artikolo pri flagoj por la Tero, mi stumblis al interreta paĝo, kiu prezentis, inter tutteraj flagoj, tiun de nova internacia lingvo, nome Lingua Franca Nova (legu: lingŭa franka nova). Mi trovis ĝin amuza kaj tial decidis prezenti ĝin al vi.

Baze, LFN estas latinida kreolo — aŭ piĝino. Historie, kreoloj kreiĝis, kiam Afrikdevenaj sklavoj devis rekrei lingvon kun la vortoj el la lingvo de la mastroj, sed simpligita gramatiko. Simila interlingvo kreiĝis ankaŭ dum la Mezepoko inter Mediteraneaj maristoj, ia miksaĵo de latinidaj lingvoj kun iom da arabaj kaj turkaj vortoj; ĝi nomiĝis lingua franca — en Esperanto lingvafrankao. En tiu ĉi kazo, ĉar la lingvo neniam estiĝis gepatra lingvo, oni ne parolas pri kreolo, sed pri piĝino.





Laŭ tiu ideo, LFN uzas latinidajn vortojn, sekve tuj rekoneblajn de parolantoj de latinidaj lingvoj, kiel franclingvanoj, sed multe malpli de alilingvanoj — laŭ tiu malnova ideo (kiun parte dividas Esperanto, sed kiu pintis en Interlingua), ke latinaj aŭ latinidaj vortoj estas la plej internaciaj.

LFN ankaŭ posedas simplan gramatikon.

Nu, ĉu Esperanto ne jam havas simplan gramatikon? Certe. Sed, kompare kun tiu de LFN, ĝi estas terure malsimpla.

LFN havas nur unu finaĵon, -s (aŭ -es), por la pluralo. Fino. Vorto kiel *dansa* povas signifi danci aŭ danco. La *dansa* signifas 'la danco', *un dansa* 'danco'. Sed *me dansa* signifas 'mi dancas', *tu ia dansa* 'ci dancis', kaj *el va dansa* 'li/ŝi/ĝi dancos'. Nu, Lingua franca nova ne distingas pronomojn laŭ seksoj, kaj uzas francdevenajn helpverbojn kaj por la pasinteco kaj por la futuro.

Same, adjektivoj ne distingiĝas el adverboj; nur la loko en la frazo montras la funkcion.

Kompreneble, ne nur la vortordo devas iĝi tre rigida (*me ama tu* ≠ *tu ama me*), ne nur iuj strukturoj estas malpermesitaj (ne eblas diri, ekzemple, 'ili elektis ŝin prezidanto' — mi ne scias kiel oni ĉi tie povas elturniĝi),

sed ankaŭ povas estiĝi dusencecoj. Mi jam diris, ke *mi dansa* signifas 'mi dancas', sed ĝi povas signifi ankaŭ 'mia danco' (ĉar personaj pronomoj uziĝas ankaŭ kiel posedaj difiniloj). Tamen, kiam oni legas tekston en LFN, ne aperas tro da malklareco.

LFN uzas, kiel Esperanto, fonetikan alfabeton. Malsimilecoj estas, ke *c* prononciĝas kiel *k*, *j* kiel *ĵ* kaj *x* kiel *ŝ*. Tio kaŭzas, ke multaj tre simplaj vortoj estas ne tuj rekoneblaj el siaj skribaj formoj (kiel foje okazas ankaŭ en Esperanto): la ĉefa paĝo de la LFNa vikio estas ĝia *paje xef*. Oni malfacile rekonas nomojn de sciencoj kiel *jeolojia*. Oni mezuras longon per *sentimetres* aŭ *cilometres*, kies mallongigoj tamen estas *cm* kaj *km*. (Nu, ne ridu: en Esperanto, oni kalkulas povojn per vatoj, kies mallongigo estas *W...*) Kaj landoj kiel *Cuait*, *Deutxland*, *Jazair*, *laman*, *Aiti* aŭ *Txile* povas perpleksigi leganton (solvoj: Kuvajto, Germanio, Alĝerio, Jemeno, Haitio kaj Ĉilio).

El la vikio de LFN (<http://lfn.wikia.com/>): ***Lingua Franca Nova es desiniada como un lingua vera simple, coerente, e fasil aprendable, per comunicas internasional. Entre la linguas construida, LFN es la plu simil a la creoles. Aprende LFN es plasente — atenta! Tu va trova otra parlores ci pote aida tu.*** [Noto: *atenta* signifas 'provi', ĉi tie 'provu!']



## La côte des Neiges

Sylvain Auclair

Depuis longtemps, je me demande comment nommer en espéranto cette structure géographique propre à Montréal et qui s'appelle la *côte* (avec, en son centre, un *chemin de la côte*). Comme j'habite Côte-des-Neiges, sur le flanc du Mont-Royal, et que le chemin du même nom traverse la montagne, on pense souvent que le terme *côte* rend compte de la dénivellation, et qu'on devrait donc le traduire par *deklivo*.

Cependant, même si le chemin de la Côte-Sainte-Catherine, tout proche, est aussi construit à flanc de montagne (bien que *contournant* la montagne), ce n'est plus du tout le cas des chemins de la Côte-de-Liesse ou de la Côte-Vertu. Qu'en est-il exactement?

À Montréal, il n'y a pas de rang, comme ailleurs au Québec. J'avais appris que les côtes avaient été la manière de diviser des concessions au sein de l'île, loin du fleuve (même s'il y avait un ruisseau qui descendait du Mont-Royal et divisait la côte Notre-Dame-des-Neiges), un peu comme les côtes dans un thorax. J'avais tort là aussi. Partiellement (en tout cas pour l'image du thorax...).

Bien sûr, il y a eu, à l'intérieur même de l'île de Mon-

tréal, de nombreuses côtes, dont la côte Saint-Laurent (à la base de l'arrondissement Saint-Laurent), la côte Saint-Léonard ou la côte Saint-Michel. Mais une recherche, finalement assez rapide, m'a bientôt appris que les côtes primitives de Montréal avaient été délimitées sur le bord du fleuve Saint-Laurent – comme la côte Sainte-Marie, la côte Verdun ou la côte Saint-Louis, sur le lac du même nom – ou de la rivière Des Praires. En fait, il s'agit de côtes... comme au bord de la mer. Il faudrait donc parler de *Bordo de la Neĝoj* pour nommer mon quartier. Même s'il n'y a pas d'eau.

(référence: <http://www.erudit.org/revue/cgq/1984/v28/n73-74/021647ar.pdf>)

Pourquoi les Neiges? À cause d'une légende entourant la construction d'une église à Rome, au IV<sup>e</sup> siècle: <http://www.magnificat.ca/cal/fran/08-05.htm>

Une chapelle du fort des Messieurs, où se trouvent maintenant le collège de Montréal et le Grand Séminaire de Montréal, était consacrée à Notre-Dame-des-Neiges, et c'est de là que partait le chemin vers la côte Notre-Dame-des-Neiges, maintenant chemin de la Côte-des-Neiges.

## Maren kant'botelo!

**Franjo LEVEQUE**

Saluton gesamideanoj,

Mi skribas al vi de Francio. Tie mi gvidas interregionan koruson **Interkant'**. Antaŭ kelkaj jaroj, profesie, mi estis muzikinstruistino en muziklernejo kaj konis tiun ŝancon hispane gvidi/kanti Kanto Ĝeneral-n 13 fojojn!

De unu jaro kaj duono ni preparas «Ĝenerala Kanto»-n de Pablo Neruda kaj Mikis Theodorakis kun orkestreto, gesolistoj kaj deklamanto (Jacques Yvart).

Georges Lagrange, famkonata franca esperantisto, tradukis naŭ poemojn. S-ro Michel Duc Goninaz tradukis unu plian poemon.

Kadre de omaĝo al G. Lagrange ni jam prezentis tiun koncerton en Francio pasintsomere. Nuntempe, kvin koncertproponojn ni havas por prepari.

Parto de la koruso «Interkant'» (25/30 gekantistoj) pretas aviadili al Kubo por prezenti tiun imponan kantverkaĵon dum UK (17-24a de julio 2010). Jam ni havas permeson de UEA prezenti tiun belegan kanton.

Sed nia projekto estos kompleta kiam ni sukcesos kuniĝi sur scenejon veran internacian koruson da, proksimume, 100 gekantistoj.

Por helpi la projekton mi pretas sendi, per reto, al ĉiuj

gekantistoj interesitaj, muzikan materialon: partituroj kaj registradoj laŭ viaj voĉoj (soprano, alto, tenoro, baso). Dum la venontaj monatoj, ĉiuj gekantemuloj povos sole aŭ grupe labori.

Mi pretos alveni Kubon unu semajnon antaŭ UK por kantigi ĉiujn kiuj preparis la kantverkaĵon. La kantprovludoj povus okazi dum po tri horoj tage la 13-14-15-16-ajn de julio 2010 surloke en Kubo kun la franca koruso «Interkant'».

Mi tute ne intencas konkurenci la internacian koruson kiu, kiel kutime, havas sian propran repertuaron kaj provludos dum UK.

Bonvolu, ĉu vi konsentus konigi tiun gravan projekton en viaj landoj aŭ regionoj?

Ĉiuj interesatoj pri Kanto Ĝenerala en Kubo kontaktu min:

**Franjo LEVEQUE**

3, rue Voltaire

22000 - ST BRIEUC (France)

Tel : + 33 (0)9 53 92 77 37

*leveque.franjo@gmail.com*

Antaŭdankegojn pro via helpo al la projekto kaj ankaŭ al kulturo/historio pri suda parto de Ameriko kaj neforgesebla esperanta momento.

Amike kaj muzike via

Franjo

Korusestrino de «Interkant'»



# INTERNACIAJ ANONCOJ

## Aperis nova versio de la Vikitradukilo

Tiu ĉi ret-servo faciligas la kreadon de novaj vikipediaj artikoloj aŭ la pligrandigon de jam ekzistantaj per aŭtomata tradukado de tekstoj el alilingvaj vikipedioj. Tiu ĉi rimedo uzas la aŭtomatajn tradukilojn al Esperanto de Apertium (nuntempe el la kataluna, la hispana kaj la angla) kaj samtempe traktas la specifajn Vikipediajn kodojn (grasajn kaj kursivajn literojn, ligilojn, kategorioj ktp).

La Vikitradukilo permesas pli rapidan kreadon de tekstoj en la Esperanta Vikipedio, kvankam, kompreneble, la tekstoj el aŭtomata tradukado postulas lingvan korrektadon kaj eventuale ankaŭ adaptadon al internacia publiko.

Hektor Alos i Font

<http://vikitraduko.saluton.dk/>

FONTO: RET-INFO

[HTTP://WWW.EVENTOJ.HU](http://www.eventoj.hu)

## Esperanto estas elektebla ĉe Livemocha

Neil Blonstein (el Nov-Jorko) atentigis pri voĉdonebleco por Esperanto ĉe la usona retejo por lingvolernado «Livemocha». Kun kvar milionoj da membroj, Livemocha estas la plej granda komunumo por lingvolernado en la mondo; ĝi proponas senpagajn diversnivelajn kursojn por 95 lingvoj. Rapide kreskis la nombro da voĉdonoj. Iom post iom ariĝis skipo da bonvolemuloj ĉirkaŭ Emilio Cid (Brazilo) por pretigi Esperanto-kurson. Laŭ ĵusa informo de Aloísio Sartorato, Rio de Janeiro, Livemocha de nun disponigas al sia klientaro kursojn de Esperanto en pluraj niveloj.

Gratulojn kaj dankegon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu bela sukceso! Ek al pliaj! ;-)

<http://www.livemocha.com/>

Fonto : Henri Masson (Francio)



# INTERNACIAJ ANONCOJ

## FEL prezentas siajn elektronikajn librojn



Elektronika libro aŭ mallonge e-libro estas libro, kiun eblas legi per elektronika aparato, principe per kiu ajn komputilo, sed ankaŭ per specialaj legiloj kreitaj por e-libroj.

E-libroj havas plurajn avantaĝojn. Unu el la ĉefaj estas, ke vi ne pagas afrankon, kiam vi mendas ilin. E-libroj ja estas senditaj al vi rete. Krome la

prezo de e-libro estas konsiderinde malpli (mezure 40 %) ol tiu de presita libro.

Dua avantaĝo estas, ke eblas tre facile fari serĉon en elektronika libro. Se vi volas trovi la ĉapitron en kiu aperas la vorto «mevoj»? Tajpu ĝin, kaj tuj la koncerna paĝo montriĝos. Luj uzantoj parolos al vi pri aliaj avantaĝoj: se vi ŝatas legi en la lito, malgranda e-legilo estas multe pli komforta ol dika libro, kiu emas ĉiam denove fermiĝi de si mem, aŭ el kiu elfalas la paĝosigno.

Iom post iom flandra esperanto-ligo eldonos ĉiujn siajn verkojn ne nur en la klasika papera versio, sed ankaŭ kiel e-libron. Jam pli ol 40 titoloj estas haveblaj en pdf-formo kaj pluraj en aliaj formoj kiel Epub aŭ en formo por mobipocket-legiloj.

### Jen kelkaj ekzemploj:

- Ĉu rakonti novele? La unua krimnovelaro de Johán Valano (= Claude Piron): 6,36 € (epub, Mobipocket)
- Kvazaŭ ĉio dependus de mi. La nova sukcesromano de Trevor Steele: 11,50 € (ePub, Mobipocket, PDF)
- Morto de artisto. La posteulo de la alia sukces-romano de Anna Löwenstein: 12,00 € (ePub, Mobipocket, PDF)
- Humuro laŭ la skota maniero. Centoj da ŝercoj arigitaj de Andrzej Pettyn, la eksredaktoro de Pola Radio: 4,80 € (ePub, Mobipocket, PDF)
- Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof: 14,39 € (PDF)

Tre regule aldoniĝos novaj titoloj al la listo. La ĝisdatan liston vi trovas en

[http://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/web\\_store/web\\_storeie.cgi?keywords=e-libro](http://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/web_store/web_storeie.cgi?keywords=e-libro)

Se vi ne certas, ĉu via komputilo aŭ via librolegilo bone prezentos verkojn en esperanto, vi povas senpage preni unu el la jenaj testlibroj:

En pdf: [www.esperanto.be/fel/but/testlibro.pdf](http://www.esperanto.be/fel/but/testlibro.pdf)

En epub: [www.esperanto.be/fel/but/testlibro.epub](http://www.esperanto.be/fel/but/testlibro.epub)

Por mobipocket: [www.esperanto.be/fel/but/testlibro.prc](http://www.esperanto.be/fel/but/testlibro.prc)

Fonto: ret-info <http://www.eventoj.hu>

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)



<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Ĉe la menuo..</i>
Vendredo	26-a de marto 2010	18 h	MEDO	Komuna kebekia vespermanĝo
Vendredo	30-a de aprilo 2010	18 h	MEDO	Fiŝa komuna vespermanĝo
Vendredo	28-a de majo 2010	18 h	Commensal	Sentema diskutado
Vendredo	18-a de junio 2010	18 h	MEDO	Barata komuna vespermanĝo
Vendredo	24-a de septembro 2010	18 h	Commensal	Jarkunsido de ESK
Vendredo	29-a de oktobro 2010	19 h 30	MEDO	Babilado pri infanrakontojn
Vendredo	26-a de novembro 2010	18 h	MEDO	Ĉina komuna vespermanĝo
Sabato	11-a de decembro 2010	18 h	Commensal	151-a datreveno de L.L. Zamenhof

**La manĝoj en MEDO estas bona ebleco gustumi ion novan. Se vi planas veni, ni petas ke vi pretigu aŭ aĉetu ion laŭ la vespera temo. Necesas anonci vian alvenon kelkajn tagojn antaŭe, se vi volas partopreni: [informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca).**

**Samtempe informu nin pri tio, kion vi planas kunporti. Vi povas ankaŭ alporti tipan trinkaĵon. Atentu ke temas pri bufedeca manĝo. Eblos varmigi manĝojn forne**

**aŭ mikroondforne. Pensu ankaŭ pretigi ion pri la temo por la vespera babilado. Kompreneble se vi ne deziras kunmanĝi, vi estas bonvena je 19 h 30.**

*Sivous désirez participer aux repas communautaires thématiques, vous devez apporter un mets. Vous devez également confirmer votre présence quelques jours avant, en mentionnant le nom du plat. Si vous ne désirez pas participer au repas, vous êtes le bienvenu à partir de 19 h 30.*

## Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

22-24 <sup>a</sup> de majo 2010	7 <sup>a</sup> MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Tririvero, Kebekio
9-11 <sup>a</sup> de oktobro 2010	17 <sup>a</sup> ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silvero, NY, Usono
21-23 <sup>a</sup> majo 2011	8 <sup>a</sup> MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
19-21 <sup>a</sup> majo 2012	9 <sup>a</sup> MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio





**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**

**La Riverego** estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro: marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafikoj: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Martin Benoît (konsilanto).

Limdato por la venonta eldono / Échéance  
pour le prochain numéro: 2010.05.20

**La Riverego** (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Francis Gauthier (riverego@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE: Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Martin Benoît (conseiller).

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8  
info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à: riverego@esperanto.qc.ca

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**  
**6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8**

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)  
(Voir site web pour un plan d'accès)

*Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo*  
*Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement*

**Service de librairie postale à Montréal**  
**La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.**

**Service de librairie postale à Montréal**  
*Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.*

[www.esperanto.qc.ca/katalogo](http://www.esperanto.qc.ca/katalogo)